

“Esti esperantisto signifas konkrete vivi la
interenaciismajn valorojn kaj agnoski profundan
unuecon inter la homoj super la kulturaj apartaĵoj”

M. kaj B. ROBINEAU

BAZARO

Esperantlingva revuo, Cluj-Napoca, Jaro III, Numero 3 (10)
1999, Aŭtuno



ISSN 1453-7478

ABONO !

La abono por la sekvanta numero de BAZARO por rumanianoj estas 3.500 leoj aŭ egalvaloro en poŝtmarkoj kaj por eksterlandanoj 1 IRK.

La abonon bonvolu sendi al jenaj adresoj:

C.P.1111. RO-3400 CLUJ-NAPOCA por KOLOZSVÁRI Zsolt aŭ

C.P.200. RO-3400 CLUJ-NAPOCA SIGMOND Júlia

Ni akceptos donacojn, subtenojn kaj varbas distribuantojn por nia gazeto!

Dankon, La red.

Pruntlibraro de BAZARO

Ni posedas pli ol 250 librojn, dank' al donacintoj. Ĉiuj geesperantistoj el Rumanio havas eblecon prunti el la libroj SENPAGE! La petitan libron ni sendos per rembursito. Ni petas maksimume dum tri monatoj ellegi la pruntitan libron. Pro la perdita libro oni devas pagi 20.000 leojn.

Al la interesiĝantoj ni sendas la liston de la titoloj.

La red.

Se vi deziras korespondi esperante, trovi geamikojn tra la mondo, skribu al:

KORESPONDA SERVO MONDSKALA

B.P.6, F-55000 Longeville-en-Barrois, Francio

La redakcio ne respondecas pro la artikoloj skribitaj de niaj kunlaborantoj, kaj ili ne nepre reflektas la opinion de la redakcio. Ni ne resendadas la manuskriptojn, nur se vi nepre petas tion!

Oni rajtas aperigi artikolojn el BAZARO, sub la kondiĉo, ke oni aperigu ankaŭ la fonton.

Redakcio:

ASOCIO de ESPERANTO CLUJ
RO-3400 Cluj-Napoca, C.P. 1111
RUMANIO

Eldonas:

Eldonejo DOKIA
P.O. Box 1-452, RO-3400 Cluj-Napoca,
RUMANIO

Redakcia komitato:

'SIGMOND Júlia, KOLOZSVÁRI Zsolt

Aperas: kvaronjare

Redactia:

ASOCIATIA de ESPERANTO CLUJ
RO-3400 Cluj-Napoca, C.P. 1111
ROMÂNIA

Editata de:

Editura DOKIA
P.O. Box 1-452, RO-3400 Cluj-Napoca,
ROMÂNIA

Comisia de redactie:

'SIGMOND Júlia, KOLOZSVÁRI Zsolt

Apare: trimestrial

**FONTO DE LA DISKORDO:
2. LA MALVERO**

Fine de decembro 1957, la kulturdomo de Braŝovo anoncis konferencon kun la temo "Esperanto, lingvo internacia", preleganto, la akademiano Remus RADULET. La konferencejo estis plenplena, la partoprenantoj manifestaciis grandan intereson, kaj la direktorino, tre afabla sinjorino, anoncis la eblecon de malfermo de kurso enkadre de Popola Universitato. Tiam, por organizi la kurson, necesis la aprobo de la lokaj aŭtoritatoj.

Por ne perdi tempon, ni decidis trovi aliajn eblecojn. La germanlingva lernejo numero 5, havigis al ni ĉambron, kaj tuj post la paso de vintraj festoj, ni inaŭguris la kurson. La instruisto estis samideano Emil BOKOR, teknikisto, estro de la transporta fako en la fabriko Steagu Rosu (Ruĝa Flago). La kurso okazis ĉiu merkrede posttagmeze, kaj ĝin partoprenis c. 40 personoj, diversaj kaj diversprofesiaj, la plej multo el inter ili junaj geknaboj. La kursejon ni uzis ankaŭ kiel kunvenejo. Tre sindonema kaj aktiva estis samideanino Adriana AVARVARI, kiu varbis multajn homojn por esperanta agado. Ŝi estis ankaŭ la kontaktpersono kun la bukareŝtaj geesperantistoj.

En la jaro 1963, la bukareŝtaj samideanoj organizis partoprenon en la 48-a U.K. en Sofio, Bulgario. Por ni, Braŝovanoj, estis rezervitaj tri lokoj. Partoprenis s-ino Adriana AVARVARI, d-ro Dorel ZAHARIE kaj Ion SÂRBU. Por mi estis okazo konatiĝi kun samideanoj enlandaj, kiujn ĝis nun mi konis nur laŭ iliaj nomoj. La plej granda gajno estis konatiĝi kun fremdaj samideanoj, inter kiuj bulgaroj, kun kiuj mi restis en konstanta kontakto, kaj de kiuj mi ricevis neimageblan helpon: abonojn je tiama bela kaj interesa revuo "Nuntempa Bulgario", beletristan literaturon, E-lernolibron, kaj dum la "Ora Epoko" eĉ diversajn varojn. La kontaktoj estis tre ofta, ĉar la bulgaroj ĝuis totalan apogon de la ŝtataj aŭtoritatoj.

Reveninte de Sofio, post la fino de la U.K., mi ĝuis grandan atenton de la konataj personoj avidaj ekscii la situacion en diversaj landoj kaj precipe en la najbara lando. Mi informis la samideanojn pri la kongreso. Pli kaj pli la informoj pri Esperanto penetris en la homojn, precipe en la fervojista medio. La intereso pri la lingvo kreskis. Multaj el la dezirantoj, kiuj volis lerni Esperanton, estis membroj de la Komunista Partio. Tial mi petis ilin diskuti la aferon de la lernado de E. kun partia aŭtoritato. Post nelonge, mi estis invitita informi ilin, fakte

kio estas Esperanto, kion deziras la esperantistoj. Krom la celo de Esperanto, mi informis ilin, ke "ni la rumanaj esperantistoj volas pruvi por la eksterlandanoj unue, ke ni ĝuas liberecon kaj due, konatigi la kulturon de rumana popolo kaj la realigadon de la popolo sub la "saĝa" gvidado de la partio!"

En la jaro 1963, Kongreso de Internacia Fervoja Esperantista Federacio (IFEF) okazis en Varna, Bulgario, en la fama banloko Oraĵ Sabloj. Mi decidis partopreni ĝin. La sekretario de komunista organizo de la lokomotiv-reparejo en Braŝovo demandis min se li povas partopreni (li ja estis kursano). Tiam mi konsilis lin trovi inter la aliaj kursanoj dezirantojn, kaj elekti grupon da 5-6 personoj. Li prezentis liston de ok fervojistoj: lokomotivestroj, trajn-ekspedistoj kaj oficistino el la Braŝova Fervoja Departamento.

Estis granda ĝojiga surprizo, la ĉeesto de rumana fervojistoj por la unuan fojon Kongreson de IFEF. Kiam la prezidanto de IFEF, samideano Joachim GIESSNER anoncis, ke estas invitata paroli la reprezentanto de rumana delegacio, la ĉeestantaro eksplode aplaudis.

La semajno kiun ni travivis inter la reprezentantoj de tutmonda fervojistaro en Varna, konkeris la animojn de miaj kolegoj. Kiam ni revenis hejmen, dank' al tiu sekretario de Komunista Partio, kiu restis fidela subtenanto de Esperanto ĝis la morto, ni ekorganizis E-kurson kadre de Fervoja Lerneja Grupo. La unuan kurson ĉe la Fervoja Lerneja Grupo partoprenis 52 fervojistoj el ĉiuj fervojaj fakoj. Inter ili ankaŭ d-ro Ioan TEREJNEU.

En la sama jaro, samideano Rudi GRAETZ, reprezentanto de Germana Demokrata Respubliko, invitis min viziti Berlinon. Tiam mi konatiĝis kun la tieaj esperantistoj, ankaŭ kun D-ro Detlev BLANKE, kiu donis al mi la ideon pri tiu serio de artikoloj "Fonto de la Diskordo".

En 1970 ni fondis Filatelan Esperanto Rondon. Tiu faciligis al ni la akiradon de abonoj ĉe diversaj Esperanto Revuoj, kaj importon de esperanta literaturo. Eĉ kvin ekzemplerojn de Plena Ilustrita Vortaro ni importis.

La lernojaro de 1968/1969 finiĝis kun plena sukceso.

En 1969 la kongreso de IFEF okazis en Avignon, Francio. Ni preparis grupon, kiu estis partoprenota tiun kongreson. Bedaŭrinde mi ne akiris vizon pro mia politika stato, sed mi ĝojis, ke la grupo de kvar lokomotivestroj partoprenis kaj ĝuis pri granda, amikeca atento de la francaj kolegoj, kun kiuj mi estis kunlaboranta jam delonge. Inter tiuj partoprenintoj troviĝis ankaŭ la sekretario de loka Komunista Partio. La

lokaj gazetoj de Avignon, sub la titolo "De Transylvani aux Dentelles", skribis tre afable pri nia grupo.

Ĝuante la protekton de partia sekretario, nun ni agis eĉ pli kuraĝe kaj sentime. La Esperanto movado atingis florantan periodon en multaj lokoj de la lando, precipe en Transilvanio.

Ion SIRBU, BRASOVO

Tre utila kaj interesa libro same por la Esperanto-parolantoj kiel por la rumanlingvaj lernantoj de ILo

ESPERANTO de Saul OSIAS

nun haveblas ĉe nia redakcio.

Sur la 242 paĝoj de tiu ĉi libro, inter interesaj opinioj pri nia lingvo ĝi entenas la Fundamenton de Esperanto, la Ekzercaron de ZAMENHOF kaj fundamentan vortaron Esperanta - Rumanan kaj Rumana - Esperantan.

Do vi ne perdu la okazon kaj rapide mendu ĝin remburse nur kontraŭ 25.000 leojn.

KOLEKTANTO

Antonina APOLLO
(estona poetino)

Ne kolektas mi la veturilojn
Ne aliajn nebezonaĵojn
Ne kolektas mi la troajn vestojn
Nek skulptitajn birdojn, fiŝojn,
bestojn
Ne kolektas mi la ornamajojn
Nek diversajn tute vanajn aĵojn.

Kuŝas en skatoloj la trezoroj,
La leteroj de amikoj foraj,
Plenaj de allogaj vortoj:
Ili skribas pri kaprica sorto
Ke forpasis bone ĉi-evento
Ankaŭ pri la pluvo kaj la vento.

Povas multe kolektadi home,
Sed en mia silentema domo
Staras sur mallarĝaj etaj bretoj
Kelkaj plenŝtopitaj skatoletoj.

La leteroj starangantan forton
havas
Ili pri la sincereco ravas,
Trafluginte la altegan limon
Mildan pacon portas en animon.
Mi kolektas ion tre valoran
De amikoj miaj amon koran.

CEZAR APREOTESEI

in memoriam

Antaŭ dek jaroj forpasis apostolo de Esperanto kaj neforgesebla amiko. Ĉe lia tombo, en tiu somera tago, mi apenaŭ povis fari mian funebran paroladon. Varmaj larmoj fluis sur miaj vangoj, falis en gutoj sur la paperon, mi ne povis vidi kaj legi la tekston, la vortoj eliris nur el forŝirita koro, kiel estis okazinta antaŭ multaj jaroj kiam mi perdis mian karan patrinon.

Mi konsciis, ke en tiu modesta tombo kuŝas por ĉiame la plej kara amiko de mia vivo. Ĉirkaŭ samaĝaj ni estis, ambaŭ filologoj, filoj de kamparanoj, kun malfacila junaĝo, kun neordinara persistemo en niaj celoj, sinceraj apogantoj de la demokratio, ĉu en lokaj forumoj, ĉu en naciaj kaj internaciaj rilatoj. Konfliktojn ni havis kun la sama aroganta dekano; ĵurnalismajn spertojn kaj iom da verkista agado, plurlingvajjn konojn ni rajtis mencii en niaj aŭtobiografioj. Ĉiam ni baldaŭ interkonsentis en la teoriaj problemoj de la literaturo aŭ lingvistiko, ĉiam ni estis la plej bonaj konsilantoj unu por la alia, ofte ni vojaĝis kune por "propagandi" Esperanton, kaj se ni estis solaj en la trajna kupeo, ni kune kantis dum la tuta vojo popolkantojn, romancojn, operajn ariojn, planis niajn aŭdiencojn, niajn eblajn respondojn al "atakoj" de kontraŭuloj de Esperanto. Li estis milda moldaviano, havis humuron (li verkis ankaŭ epigramojn), nekredeblan paciencon, kaj volonte vojaĝis per la trajno, ĉiam je la dua klaso: ni estis "dividintaj" la landon por informi la aŭtoritatojn, la verkistojn, la ĵurnalistojn por prelegi en universitatoj, en akademiaj aranĝoj, en kulturdomoj ktp.: li prenis la malproksimajn urbojn, mi la proksimajn (escepte de Bukareŝto, kie mi havis pli multajn konatajn gravulojn dank' al mia longa aktivado kiel universitatano, ĵurnalisto kaj verkisto-kritikisto en la ĉefurbo).

Modesta, diligenta, simpla estis "Cezaro", kvankam malofte mi renkontis kolegon kun tiaj plurflankaj kvalifikaĵoj kaj vivospertoj. Li estis studinta en Instituto pri Ekonomiaj Sciencoj, poste en Supera Lernejo por Oficiroj (li estis oficiro en marista armeo kaj veterano en la kontraŭfaŝista milito), poste li kvalifikigis en slavaj lingvoj en Instituto Maksim Gorkij en Bukareŝto, havis jurajn kaj filozofiajn konojn. Liaj seriozaj labormetodoj, prestiĝaj artikoloj pri lingvistiko aperintaj en fakaj revuoj eksterlandaj, liaj plurfakaj konoj, faris lin membro de la Komitato Tutnacia de la Historio kaj Filozofio de la Scienco, membro

de la Internacia Komitato de la Asocio de la Slavistoj, membroj AIS, membro de la Societo "Stefan ODOBLEJA" (kiun li persone konis kaj ofte kontaktis ties filon, la d-ron ODOBLEJA), li havis bonajn rilatojn kun la renoma Constantin DRĂGAN. Bonvolu rimarki estimata leganto, ke ĉiuj tiaj laboroj estis senpagaj, ili spegulis nenian personan intereson, nur la socian neceson. Tial li ankaŭ batalis por la rajtoj de Traian VUIA, kolektis ties artikolojn, leteroj, sed la koro de Cezar ĉesis bati antaŭ ol aperigi la libron pri Traian VUIA.

Tia grandanimeco kaptis lin ankaŭ por Esperanto. Post mia reveno el Berlino, kie mi docentis inter 1965-1970 kaj esperantistiĝis, Cezar APREOTESEI estis la unua mia akiro inter la universitatoj kaj sciencistoj, kaj samtempe la plej fidela, persistema, pasia. Ĉiam li kunportis grandan aktujon kun E-lingvaj revuoj kaj unu du libroj dum siaj vojoj, por konkrete montri al la homoj, ke Esperanto jam bonege funkcias en diversaj sferoj de la scienco, kulturo kaj ĝenerala socia vivo.

Multaj estas la memoreblaj momentoj de nia poresperanta batalo, kaj mi jam plurajn rakontis en miaj memorajoj aperintaj en revuo "Renasterea Banateana". Kiel prezidantoj de komisioj de abituriento aŭ pri gradoj (du aŭ unu) de liceaj instruistoj, kiel membroj de sciencaj kaj kulturaj organizoj, ni ĉiam uzis la okazojn informi pri Esperanto. Kelkfoje la aŭtoritatoj ne sciis, ke Esperanto estas malpermesita, kelkfoje ni trompis ilin anoncante prelegon ne pri Esperanto, sed pri "Lingvaj solvoj en la tempo de scienca kaj teknika revolucio" k.s. kaj kiam la "kamarado" vidis, ke temas pri Esperanto, ili riproĉis al ni la trompadon, kaj faris nin morale respondecaj, se ili perdos siajn funkciojn (ekzemplojn mi citis en Renasterea Banateana"). Iun okazintaĵon mi ne rakontis ĝis nun, sed tiu momento interesas la esperantistojn. Th. TRAPCEA, kolego de Cezar, diris al mi, ke li partoprenis iam, en iu apud danuba urbo (eble en Orsova, se mi bone memoras) plurajn E-aranĝojn kaj jen liaj konkludoj:

1. "La homoj ne povis interkompreniĝi en Esperanto, kvankam ili klopodis tion: ili ĉiam denove falis en la nacian lingvon." Tio estis por ili pruvo, ke Esperanto ne funkcias. certe la homoj estis komencantoj, ni respondis, kaj estis lernintaj la lingvon kaŝe, sen lernolibroj, sen instruistoj, sen internaciaj kontaktoj, sen ĵurnaloj, revuoj, libroj. Ĉu vi postulis de aliaj homoj interkompreniĝi en la franca aŭ germana aŭ rusa, kiujn ili estis lernintaj dum pluraj jaroj en oficialaj kursoj kun ŝtata helpo? Vi estus vidinta, ke ili

balbutas senespere, kvankam la koncernaj lingvoj jam delonge funkcias.

2. "Vi batalas por Esperanto", li aldonis, sed mi rimarkis, ke la esperantistoj tute ne ŝatas sciencistojn, ĉar tiuj ĉi akiras prestiĝon dum la malnovaj esperantistoj ofte estas arogantaj, orgojlaj, pluraj volas esti prezidantoj, gvidantoj ktp. Jam inter ili daŭre kvereladas kaj tamen al la mondo ili promesas "sanktan harmonion". –diris moke Th. Trapcea.

Nu, kvereloj estas ĉie, ni respondis, sed vi ne rajtas mallaŭdi la esperantistojn, ĉar en la movado jam estas multaj kaj respektataj sciencistoj kaj fakte la malnovaj esperantistoj kutime pli bone regas la lingvon, tre sinofere kaj senpage instruas ĝin, faras grandan organizan laboron, kulturajn aranĝojn – agado ege utila; male multaj sciencistoj eĉ ne partoprenas lokajn E-aranĝojn ktp. Cezaro tre miris pri la opinioj de sia kolego, kaj riproĉis al tiu la tre mallargajn ŝatokupojn, la nekapablecon forlasi la limojn de propra fako ktp.

Signifa estas por la grandanimeco de APREOTESEI la fakto, ke li atenta nur al la ĝeneralaj intereso de la socio, ne kolektis siajn studojn en libron, kaj pro tio li ne profesoriĝis, restis por ĉiam docento, kvankam li delonge doktoriĝis kaj havis pli da studoj kaj artikoloj ol necesaj por libro. Oni konas en la kulturhistorio plurajn tiajn sciencistojn indiferentajn rilate al propraj intereso. Por ni ambaŭ li havis kromnomojn: min li alinomis DONKIHOTO kaj sin mem SANCO PANZA.

Nuntempe mi ofte rememoras la multajn analizojn kaj agadojn, kiujn Cezar kaj mi faris dum ĉirkaŭ du jardekoj. Por mi la hodiaŭa situacio de la Esperanto-movado estas nekontenta. Ĉu naciaj, ĉu kelkaj internaciaj E-organizaĵoj havas nur surpaperan agadon, fikciajn membrojn, ili aspektas kiel kredo sen apostoloj, armeoj sen gvidantoj, komunumoj displektitaj en izolitajn grupetojn, kelkfoje unu sabotantaj la agojn de alia; publikaj eĉ skribaj kvereladoj konfuzas la sincerajn batalantojn por nia nobla ideo. Feliĉe troviĝas multaj grupoj vere agantaj en esperantista etoso, sopirantaj je unuiĝo de la fortoj, je harmonio kaj kunlaboro. Tio estas vera esperantismo. Bonvolu memori pri la kvar renkontiĝoj kadre de la Universitato de Timisoara, ekde la 29-an de majo 1978, kiam per Decido de Akademio de Sociaj kaj Politikaj Sciencoj, oficialiĝis la E-agado en Rumanio, ĝis la 5-an de februaro 1985, kiam per ordono de la vicministro CIUCU, la E-kursoj kaj aranĝoj estis malpermesitaj en universitatoj. Dum kelkaj jaroj la rumana movado multe pligrandiĝis, plifortiĝis, plijuniĝis kaj scienciĝis,

oni enkondukis Esperanton en la filologiajn fakultatojn, en akademiajn simpoziojn, en la Tutlandajn Asociojn de Filologoj, kvankam ni havis malmultajn fortojn, sed tiuj fortoj efikis supre en decidpovaj organoj kaj gremioj. Tion ne sukcesis fari multaj eksterlandaj movadoj, kvankam ili havis dungitojn, monon, ŝtatan helpon, revuojn, eksterajn kontaktojn, dume ni faris ĉion dum la plej aĉa diktaturo. Nur klarigo estas por tio: la sindonema kaj nekredeble multa agado de kelkaj esperantistoj el la tuta lando, kune kun batalantaj universitatoj el Timisoara, Bukareŝto, Iasi kaj Kluĵo. Inter tiuj batalantoj Cezar APREOTESEI ludis gravan rolon. Li apogis la sciencon etoson en nia movado, la disciplinon libere konsentitan, la respekton inter la esperantistoj kaj per propra agado li donis signifan ekzemplon.

Mi klinas mian fronton antaŭ via ombro, granda batalanto kaj neforgesebla, neanstataŭebla amiko.

Florian Ignat BOCIORT, GERMANIO

LA MIRAKLA ALOE

Aloe Barbadensis Miller estas subtropika planto, kiu estas unu el 250 specioj. Tiu estis fama pro kuracifiko ekde pratempo, kiun uzis kiel "popolan kuracilon". La nomon ricevis de botanikisto Miller, kiu enklasigis Aloe-n de la plantoj troveblaj en Barbadoso. La vorto devenas el la araba "Aloeh", kiu signifas "grandiozan, amaran substancon", ĉar la flava suko de la planto estas amara. Laŭ supozo Aloe estis malkovrita en Afriko, kiu disvastiĝis pli poste en la regiono de Mediteraneo. Hodiaŭ ĝi troveblas preskaŭ ĉie en la mondo.

Aloe Barbadensis Miller estas konata en la komerco, kiel Aloe vera, laŭ la latina nomo. Aloe vera estas kuracplanto, kiun oni uzas ankaŭ en la moderna medicino por la terapio. La produktaĵojn fabrikas kaj komercadas la Forever Living Products International, farmacia kompanio el USONO ekde 1980, kiu havas filiojn en multaj landoj. Por la uzado en la terapio, tiu kompanio solvis la problemon stabiligi la substancon, kiun enhavas tiu planto. La stabiligita substanco estas la Aloe vera ĝelo. Aloe vera enhavas du substancojn: unu estas la jam menciita flava suko, kiun oni uzas por produkti diversajn medikamentojn, kaj la alian substancon, kiu estas uzebla kiel nutraĵoj kaj kosmetikaĵoj. Ekde 1981 funkcias ankaŭ la Internacia Aloe Scienca Konsilantaro (IASC), kiu gvidas la sciencajn eksperimentojn rilate al kuraca efiko de tiu planto.

Aloe vera enhavas 6 desinfektajn substancojn: lupeolo, salicilata acido, nitrogen-karbamido, cinamacido, fenolo kaj sulfo. Aloe vera enhavas ankaŭ 3 kontraŭinflamajn grasacidojn: kolesterolon, kampesterolon kaj B-sitosterolon, kiuj ludas la rolon en la kuracefiko de la Aloe vera, en la kuracado de diversaj malsanoj. Aloe vera produktaĵoj pro sia desinfekta efiko neniigas la bakteriojn, virusojn kaj fungojn, krome tiu stimulas la regeneradon de la histoj, eliminis la toksajn substancojn, kaj normaligas la metabolojn. Aloe vera entenas vitaminojn: A, B1, B2, B3, B6, B9, B12, C kaj E vitaminojn. Okaze de stabiliga procedo, la substanco ricevas ankaŭ vitaminojn A kaj C. Aloe vera enhavas mineralojn: kalion, fosforon, kalcion, feron, manganon, natrion, kloron, magnezion, kupron, kromon kaj zinkon. Ĝi entenas mono- kaj polisaharidojn: celulozon, glukozon, manozon, aldozon, alinazon kaj ramnozon. La enhavo de aminoacidoj: aspartata acido, glutamata acido, alanino, arginino, cistino, glicerolo, histidino kaj hidroksiprolino, kiuj estas neesencaj aminoacidoj. La esencaj aminoacidoj: izoleŭcino, leŭcino, lizino, metionino, fenilalanino kaj valino.

Enzimoj kaj efikoj: la oksidada enzimo de Aloe redoksas la bazajn elementojn. Aloe enhavas fosfatazon, amilazon, bradikinazon (analgezio, kontraŭinflamo, imunsisteman stimulon), katalazon (malakcelas la akumulon de la hidrogena peroksido), celulozon (malkonstruas la celulozon), kreatinan fosfokinazon (katalizas la kreatino-produkton, kiu bezonas por la energio enmagazenita en la muskoloj), lipazon (stimulas la diĝeston), nukleotidazon, alkalifosfatazon, proteazon (pere de hidrolizo stimulas la malkreskon de la proteinoj).

Aplikado de Aloe produktaĵoj: alergio, artrozo, reŭmatismaj malsanoj, bronketito, astmo, brulvundigoj, haŭtmalsanoj, diabeto, gastrointestaj malsanoj, tuberkulozo, kancero, AIDOSO, aŭtoimunaj malsanoj, aterosklerozo, hepatitoj, pankreatitoj, ostoporozo, okulmalsanoj (inflamoj, katarakto, glaŭkomo), prostataj malsanoj, klimakso.

D-ro LÁZÁR Gábor,
emerita cefkuracisto, COVASNA

Kiu interesiĝas pri Aloe Vera produktaĵoj, turnu sin al:
D-ro LÁZÁR Gábor, str. Stefan cel Mare 26/A, RO-4055
COVASNA, RUMANIO

BELARTAJ KONKURSOJ 1999

La unuan fojon gajnis esperantistino el Rumanio je la sekcio Kanto! Ŝi estas s-ino Valentina Maria NAN, kiu per la kanto "Ami" gajnis la premion "AHN Song-san".

Elkore ni GRATULAS al ŝi!

La red.

Luksa, esperantlingva eldono de la filozofiplena, mondfama poemo de Mihai Eminescu, LUCIFERO, en la traduko de Jozefo PETRIN, haveblas ĉe la redakcio de BAZARO.

Ĝi mendeblas ramburse kontraŭ 25.000 leojn.

La familio ROBINEAU vizitante nian landon, partoprenis renkontiĝon ce E-klubo en Oradea. Ilia grandsukcesa libro "Ili vivis sur la tero" ĝuste estis prunteprenita el nia Pruntlibraro de samideano MAKAY Attila, kiu petis ilin dediĉi en la libron. Jen ilia enskribita teksto:

"Al la Rumanaj Amikoj,

Ni deziras al vi agrablan kaj fruktodonan vojaĝon tra la mondo kaj tra Esperantio.

Okaze de nia renkontiĝo kun la klubanoj de Oradea,

24.08.1999

Maryvonne
Vincent

Bruno
Sarah

Robineau"

AŬSTRALIO - REVENO AL LA TERO DE REVADO

Kelkaj aborigenoj revenas al siaj praavaj teroj. Jen veto por tiuj forlasitoj de l'historio kaj de la aŭstralia blanka socio.

La vilaĝo Tennant Creek ŝajne dormas sub la varmo. Vagas sur la stratoj kelkaj nigrahaŭtaj viroj kaj virinoj, kun tre malgaja mieno, se ne mortebriaj. Naŭdek elcentoj de la aborigenoj el Tennant Creek senlaboras.

Ni rapide forlasas la asfaltan vojon. Post okdek kilometroj da ruĝa tero, ni alvenas al ses kabanoj el onda lado. Ili formas la aborigenan komunumon de Kalumpulpa, kien ni venas partopreni en

projekto pri plantado de arboj. Antaŭ ses jaroj la maljuna Harry enmigris kun sia klano al tiu ĉi tero, kiu estis ilia antaŭ la alveno de la blankuloj. Ses familioj vivas ĉi tie, kune kun kelk-trideko da skabiaj hundoj.

Ĉi matene, la virinoj iras serĉi tuberojn. Gladys klarigas ĉiujn viv-rimedojn de la veprejo, al ni kiuj ne vidas ion manĝeblan ĉi tie, kaj rapide mortus pro malsato en tiu duondezerto. "Ni trovas tuberojn kaj, laŭ la sezonoj, sovaĝajn fruktojn, prunojn, figojn... Vidu ĉi-arbe troviĝas mielo. Ni virinoj, ĉasas la etajn bestojn, la lacertojn..." El nia plukado ni kunportas plurajn manĝeblajn radikojn kaj dikajn vermojn, blankajn kaj grasajn. Laŭdire frandaĵo, proteino riĉa! Ĉi tage la komunumo pompe festenas. La viroj alportis belan kanguruon, kiu rapide enigas la fornon fositan rekte en al tero kaj kovritan per branĉoj.

Por ĉasi kanguruon, emuojn kaj sovaĝajn meleagrojn, la viroj anstataŭigis la bumerangon de siaj praavoj per fusilo. Kaj por kompletigi la veprejan menuon, la virinoj temp'al'tempe iras al la superbazaro de Tennant Creek. Ĉu pro tio ili perdis sian kulturon? Ne, plu restas la sankta rilato kun la naturo kaj iliaj praavoj, la kundividemo interne de la klano.

La vivo de la aborigenoj baziĝas sur la spirita ligilo kiun ili flegas kun la tero. Por ili, ĝi ne estas posedebila. Ili estas parto de ĝi. Ili respondecas pri ĝi, ĝi estas ilia animo kaj ilia vivo. En Kalumpulpa, la klano de maljuna Harry do retrovis sian teron tie, kie radikas ĝia kulturo kaj ĝia digno, tie, kie iliaj praavoj travivis la "tempon de revado".

Sed necesas mono por pagi la fusilon, la veturilon, la instruadon de la infanoj... Demando al la maljuna Harry: "kiel vi povas perlabori iom da mono en tiu veprejo, por ne tro dependi de la asigno por senlaboruloj?" "Aŭ, ne zorgu virineto - li ĉiam nomis min tiel - mi scias elturniĝi. Ĉi tie oni povas havi etan bredo-bienon. Ni ĉiuj laboris kiel vakeroj, kaj estas multaj sovaĝaj bovoj, kiujn ni kunigas por okupiĝi pri ili."

Ili ankaŭ ekkultivas malgrandajn legom-ĝardenojn kaj bredas kelkajn kokinojn. Ĉiuj semsaketoj estas videble ŝutitaj samloke, kaj kunpremitaj unuj kontraŭ la aliaj, nur la tomato plantaĵoj malfacile kreskas. Oni ne transformiĝas de ĉasisto-plukisto al terkulturisto en unu tago. Neniu gvidas ilin. Sed ekzistas volo elturniĝi, provi sintezon inter du mondoj. Volo i.a. konkretigita per la decido de la maljunuloj forigi alkoholon el la komunumo. Ĉiujn aborigenajn familiojn trafas tiu plago.

Side sur polvo, ni konversacias kun la virinoj. Ni montras niajn familiajn fotojn, kaj ili lernigas al ni kelkajn vortojn el siaj lingvoj. Kvar ili parolas: La warlmanpa-n, la warlpiri-n la warrungu-n kaj la anglan. Sufiĉe bone por homoj, kiujn multaj rigardas primitivoj! La virinoj scivole demandas: "En kiu direkto estas Francio?" Ne facilas, ja, konkretigi la vojon por iri de Kalumpulpa, meze de la aŭstralia veprejo, al Saint Pierre -Montlimart, mia naskiĝvilaĝo, ie kuŝanta en la franca kamparo!

Maryvonne ROBINEAU, FRANCIO

BOLIVIO: GAJA FESTO DE ĈIUJ SANKTULOJ

En la katolika kalendaro, la Festo de Ĉiuj Sanktuloj, festo de la mortintoj, estas iom malgaja dato, kiel ĉio kio rilatas al la morto. Tute malsamas en Bolivio, kie miksiĝas kristanaj konceptoj kaj tradiciaj ritoj. Tie, la Festo de Ĉiuj Sanktuloj estas unu el la plej gravaj festoj en la jaro.

Jam de pluraj tagoj, la familioj el kiuj iu mortis ĉi jare, febre preparas la feston. Ĉio devas esti preta kiam parencoj kaj geamikoj faras viziton, la 1-an de novembro.

Tiun tagon, la "chicha", maizalkoholo, fluegas kaj, laŭ la kutimo, manĝo estas servata al ĉiuj vizitantoj. De domo al domo ne varias la menuo, kaj oni nepre devas manĝi sian porcion de kokidaĵo ĉe ĉiuj vizitataj familioj, nome ĉ. ĉiun duonhoron. Ni satiĝos ekde la dua teleraĵo!

La manĝo estas servata antaŭ la "tumba", speco de lataro. Nenio damaĝis siajn penojn, nek sian monon por realigi la plej eble belan "tumba". Sur la muro pendas paperfiguretoj kaj tuparetoj el panpasta - laŭdire por pli rapide grimpi al la ĉielo! - La altaro subfalas la lavangon da manĝaĵoj. Estas pluraj centoj da bananoj, oranĝoj, ananasoj, papajoj, kukoj kaj panoj, ladskatoloj...

Unu glaseto de dolĉa vino el Argentino, ankoraŭ unu trinkregalo da "chicha" kaj ek al la proksima domo. Ni konversaciis, interŝanĝis ŝercojn, manĝis kaj trinkis, sed la momento de pia enmemigo antaŭ la "tumba" estis mallonga. Ankaŭ neniu kondolenco al la familio multokupita por servi siajn gastojn. Ĉar defilos preskau cento el ili ĉi posttagmeze, ĉar la kutimo volas, ke oni vizitu ĉiujn konatojn, kiuj ĉi jare perdis familion.

Forirante, ĉiu gasto kaŝe ŝovas en la manon de la gastiganto bankbileton je 5 aŭ 10 bolivianoj (1B=1,30FF). Partopreno de la komunumo de la grandegaj elspezoj kiujn la Festo de Ĉiuj Sanktuloj neprigas por la familio de la mortinto.

En la dua domo kien Don Jose kaj Roberta Martinez, niaj genajbaroj el Carcaje, vilaĝeto el la valo de Cochabamba, kondukas nin, la infanoj-preĝantoj jam laboras. Po grupoj el kvin aŭ ses, ili tiel iras de domo al domo por ricevi monon, fruktojn aŭ frandaĵojn, interŝanĝe de siaj preĝoj por la mortinto. La knaboj tiel plenumas gravan laboron, la "hacer rezar" ("preĝigon"), kiu devas helpi la mortinton eviti la suferon en purgatoro aŭ infero, kaj kiu malebligos, ke malbeno trafu la familion.

Kelkajn horojn poste okazas por ni la sesa vizito. Malfruiĝas. La bovloj de "chicha" amasiĝas kaj delonge plej multaj el la gastoj ebriiĝis. Antaŭ ol trempi siajn lipojn en la kalabason, oni devas verŝi teren iom da "chicha" por danki la Pachamama, la teropatrino, pro siaj bonfaroj. Sekve, la tretita tera grundo estas tute moligita pro tiuj abundaj drinkadoj kaj oni vadas en koto. Aŭdiĝas ridoj kaj ŝercoj.

Pri tio la mortintoj certe estos kontentaj. Ĉar la Festo de Ĉiuj Sanktuloj estas la tago, kiam la animoj de la mortintoj rehejmiĝas. La abunda nutraĵo kaj la ĝojo favore impresas ilin kaj pruvas al ili la bonan situacion de la familio kiun ili forlasis. Pasiginte tiun agrablan tagon kun siaj familianoj, la animoj povos trankvile reiri al sia reĝlando.

La morgaŭan tagon de la Festo de Ĉiuj Sanktuloj, tago de la mortintoj, la familio Martinez iras al la tombejo kie regas plena aktiveco. Tendoj estis starigitaj kie la familianoj atendas la vizitantojn kaj, ĉe la tombeja enirejo, bonbon- kaj glaciaĵvendistoj prosperas.

Ĉiu zorgas pri la tombo de sia mortinto, aranĝante bukedojn kaj funebrajn kronojn kaj poste, provas varbi grupon da infanoj-preĝantoj, kiuj sinproponas de tombo al tombo. Oni ankaŭ klopodas por disponi pri la muzikistoj, kiuj por dek bolivianoj plorĝemigas siajn violonojn kaj trumpetojn honore al la mortinto.

Ĉiuj tomboj estas ornamitaj per floroj, la tombejo ne estas la reĝlando de la mortintoj sed de la vivo. Grupe sidante sur la tomboj, la plenkreskuloj diskutas, dum la infanoj ludas inter la teramasoj. Sola malgaja bildo: funebre vestita virino sidanta kun siaj du filinetoj apud nova tombo. Sur ŝiaj vangoj ankoraŭ vidiĝas la spuroj de siaj larmoj.

Iom post iom la tombejo senhomiĝas kaj ekstere ĉiu familio donas nutraĵon kaj "chicha" al tiuj kiuj vizitas ĝin. La botelo de alkoholo cirkulas.

Jam delonge falis la nokto, kiam la muzikistoj repakas siajn instrumentojn kaj ĉiuj disigas, sin gratulante pri la bela festo kiun oni ĵus pasigis. La multnombraj, glutitaj bovloj da "chicha" igas Don Jose filosofa. "Povas okazi, ke morgaŭ mi mortos, sed necesas resti serena... Evidente ni estas malgajaj pro niaj mortintoj. Sekve oni forpelas sian tristecon per la "chicha"!"

Maryvonne ROBINEAU, FRANCIO

Por ekkoni tiun eksterordinaran aventuron, ni proponas al vi la jenan libron:

Ili vivis sur la tero - ok jaroj da migrado cirkaŭ nia planedo
240 paĝoj - 8 paĝoj kun koloraj bildoj

Havebla ĉe UEA aŭ Bruno ROBINEAU - 49270 Landemont - Francio
Tel./Faksilo: +02 40 98 78 76 - E-posto: Bruno.Robineau@wanadaoo.fr
120FF+Sendokosto: 20FF por Francio - 30FF por aliaj landoj

ANDREO CSEH NASKIĜIS ANTAŬ 104 JAROJ

Honore al la memoro de la MONDA ESPERANTO GLORO, Andreo CSEH, la esperantistaro ĉi jare festas lian 104-an naskiĝtagon.

Li naskiĝis la 12-an de septembro de 1895 en Marosludas (nun Ludus en Rumanio). Li lernis Esperanton en 1919, ĝuste kiam li fariĝis rom-katolika pastro.

En SIBIU, en 1920 li ellaboris sian faman instrumentodon, vaste konata ĝis hodiaŭ, kiel Ĉe metodo, kaj helpe de ĝi li iris triumfan vojon en la Esperanto-Movado.

En 1924 li iĝis sekretario de Internacia Centra Komitato en Ĝenevo. Inter liaj disciploj troviĝas konataj homoj en nia movado, kiel Julio BAGHY, Jean FORGE, Tiberiu MORARIU, Margarete SAXL, Henrik SEPPIK, Lidia ZAMENHOF ktp.

Kune kun gesinjoroj ISBRUCKER li fondis la Internacian Cseh-Instituton en Nederlando, kies nomon poste ŝanĝigis al Internacia Esperanto Instituto.

En 1932 li kreis la revuon "LA PRAKTIKO", kiun li gvidis kaj redaktis dum ĉirkaŭ 30 jaroj. Li estis ankaŭ la kreinto de la E-monunuo, la "STELO". Andreo CSEH estis honora membro de UEA kaj kunfondinto de la Universala Ligo.

SZÚCS Iréné, ORADEA

Ni dankas al s-ino SZŪCS Iréné el ORADEA, kiu subvencias nian revuon per 50.000 leoj.

La red.

TUTLANDA ESPERANTO-SEMINARIO

Inter 17-19 de septembro en Sfântu Gheorghe okazis Tutlanda Seminario de Esperanto. Ĝin partoprenis reprezentantoj, bedaŭrinde, nur el Baia Mare, Bicsad, Braşovo, Kluĵo, Miercurea Ciuc, Praid, Sfântu Gheorghe, Slatina kaj Timisoara.

Vendrede alvenis la partoprenantoj kaj ili estis kondukitaj de la organizantoj al siaj loĝejoj al la lernejo "Grupul Scolar de Cooperatie", kie ili ankaŭ manĝis dum la restado.

Sabate matene je la naŭa horo estis la solena malfermo en la liceo "Mihai Viteazul". Unue profesoro Mihai Trifoi prezentis la historion de esperanta movado en la distrikto Covasna, dum la periodo 1990-1999. Lin sekvis tri lernantinoj el Bicsad, kiuj prezentis scenejton "La amikinoj" en Esperanto. S-ino Aurora Bute AER (Asocio de Esperanto en Rumanio) estrino parolis pri la movado de Esperanto en Rumanio. Posttagmeze ŝi gvidis interesan ludkurson de Esperanto. Antaŭtagmeze la reprezentantoj de Kluĵo, Praid kaj Miercurea-Ciuc parolis pri la E-movado en siaj urboj.

Dimanĉe la partoprenantoj faris agrablan ekskurson al Tusnad kaj al Bicsad, kie la grandanima profesoro Mihai Trifoi gvidis malfermitan lecionon kun granda sukceso en la kvina klaso de la lernejo. Ĉi tie estis ankaŭ la urbestro BALOGH; kiu parolis pri la historio de la urbeto.

La ĉi jara Tutlanda Seminario de Esperanto en Sfântu Gheorghe, laŭ mia opinio estis tre sukcesa, kaj ĝi lasis por ĉiuj belajn memorojn.

Doina BURZO, CLUJ-NAPOCA

Pro la donace senditaj libroj por la Pruntlibraro, la redakcio de BAZARO dankas al:

Anneke SCHOUTEN-BUYS el Nederlando;

Gigi HARABAGIU el USONO;

Ionel ONET el USONO.

FUNDAMENTA KRESTOMATIO DE LA LINGVO ESPERANTO de D-ro L. L. ZAMENHOF

§13. (Ekzercaro, §17.)

La feino (Daŭrigo)

Kiam tiu ĉi bela knabino venis domen, sia patrino insultis ŝin, kial ŝi revenis tiel malfrue de la fonto. "Pardonu al mi, patrino", diris la malfeliĉa knabino, "ke mi restis tiel longe". Kaj kiam ŝi parolis tiujn ĉi vortojn, elsaltis el sia buŝo tri rozoj, tri perloj kaj tri grandaj diamantoj. "Kion mi vidas"! diris ŝia patrino kun grandega miro. "Ŝajnas al mi, ke el ŝia buŝo eksaltas perloj kaj diamantoj! De kio tio ĉi venas, mia filino?" (tio ĉi estis la unua fojo, ke ŝi nomis ŝin sia filino). La malfeliĉa infano rakontis al ŝi naive ĉion, kio okazis al si, kaj, dum ŝi parolis, elfalis el ŝia buŝo multego da diamantoj. "Se estas tiel", diris la patrino, "mi devas tien sendi mian filinon. Marinjo, rigardu, kio eliras el la buŝo de via fratino, kiam ŝi parolas; ĉu ne estus al vi agrable havi tian saman kapablon? Vi devas nur iri al la fonto ĉerpi akvon; kaj kiam malriĉa virino petos de vi trinki, vi donos ĝin al ŝi ĝentile."

§14. (Ekzercaro, §18.)

Li amas min, sed mi lin ne amas. Mi volis lin bati, sed li forkuris de mi. - Diru al mi vian nomon. - Ne skribu al mi tiajn longajn leterojn. - Venu al mi hodiaŭ vespere. - Mi rakontos al vi historion. - Ĉu vi diros al mi la veron? - La domo apartenas al li. - Li estas mia onklo, ĉar mia patro estas lia frato. - Sinjoro Petro kaj lia edzino tre amas miajn infanojn; mi ankaŭ tre amas iliajn (infanojn). - Montru al ili vian novan veston. - Mi amas min mem, vi amas vin mem, li amas sin mem, kaj ĉiu homo amas sin mem. - Mia frato diris al Stefano, ke li amas lin pli, ol sin mem. - Mi zorgas pri ŝi tiel, kiel mi zorgas pri mi mem; sed ŝi mem tute ne zorgas pri si kaj tute sin ne gardas. - Miaj fratoj havis hodiaŭ gastojn; post la vespermanĝo niaj fratoj eliris kun la gastoj el sia domo kaj akompanis ilin ĝis ilia domo. - Mi jam havas mian ĉapelon; nun serĉu vi vian. - Mi lavis min en mia ĉambro, kaj ŝi lavis sin en sia ĉambro. - La infano serĉis sian pupon; mi montris al la infano, kie kuŝas ĝia pupo. - Oni ne forgesas facile sian unuan amon.

§15. (Ekzercaro, §19.)

La feino (Daŭrigo)

"Estus tre bele", respondis la filino malĝentile, "ke mi iru al la fonto"! - "Mi volas ke vi tien iru", diris la patrino "kaj iru tuj"! La filino iris, sed ĉiam murmurante. Ŝi prenis la plej belan arĝentan vazon, kiu

estis en la loĝejo. Apenaŭ ŝi venis al la fonto, ŝi vidis unu sinjorinon, tre riĉe vestitan, kiu eliris el la arbaro kaj petis de ŝi trinki (tio ĉi estis tiu sama feino, kiu prenis sur sin la formon kaj la vestojn de princino, por vidi, kiel granda estos la malboneco de tiu ĉi knabino). "Ĉu mi venis tien ĉi", diris al si la malĝentila kaj fiera knabino, "por doni al vi trinki?" Certe, mi alportis arĝentan vazon speciale por tio, por doni trinki al tiu ĉi sinjorino! Mia opinio estas: "prenu mem akvon, se vi volas trinki". - "Vi tute ne estas ĝentila", diris la feino sen kolero. "Bone, ĉar vi estas tiel servema, mi faras al vi donacon, ke ĉe ĉiu vorto, kiun vi parolos, eliros el via buŝo aŭ serpento aŭ rano".

§16. (Ekzercaro, §20.)

Nun mi legas, vi legas, kaj li legas; ni ĉiuj legas. - Vi skribas, kaj la infanoj skribas; ili ĉiuj sidas silente kaj skribas. - Hieraŭ mi renkontis vian filon, kaj li ĝentile salutis min. - Hodiaŭ estas sabato, kaj morgaŭ estos dimanĉo. - Hieraŭ estis vendredo, kaj post-morgaŭ estos lundo. - Antaŭ tri tagoj mi vizitis vian kuzon kaj mia vizito faris al li plezuron. - Ĉu vi jam trovis vian horloĝon? - Mi ĝin ankoraŭ ne serĉis; kiam mi finos mian laboron, mi serĉos mian horloĝon, sed mi timas, ke mi ĝin jam ne trovos. - Kiam mi venis al li, li dormis; sed mi lin vekis. - Se mi estus sana, mi estus feliĉa. - Se li sciis, ke mi estas tie ĉi, li tuj venus al mi. - Se la lernanto sciis bone sian lecionon, la instruanto lin ne punus. - Kial vi ne respondas al mi? - Ĉu vi estas surda aŭ muta? - Iru for! - Infano, ne tuŝu la spegulon! - Karaj infanoj, estu ĉiam honestaj! - Li venu, kaj mi pardonos al li. - Ordonu al li, ke li ne babilu. - Petu ŝin, ke ŝi sendu al mi kandelon. - Ni estu gajaj, ni uzu bone la vivon, ĉar la vivo ne estas longa. - Ŝi volas danci. - Morti pro la patrujo estas agrable. - La infano ne ĉesas petoli.

§17. (Ekzercaro, §21.)

La feino (Daŭrigo)

Apenaŭ sia patrino ŝin rimarkis, ŝi kriis al ŝi: "Nu, mia filino?" - "Jes, patrino", respondis al ŝi la malĝentilulino, elĵetante unu serpenton kaj unu ranon. - "Ho, ĉielo!" ekkriis la patrino, "kion mi vidas? Ŝia fratino en ĉio estas kulpa; mi pagos al ŝi por tio ĉi"! - Kaj ŝi tuj kuris bati ŝin. La malfeliĉa infano forkuris kaj kaŝis sin en la plej proksima arbaro. La filo de la reĝo, kiu revenis de ĉaso, ŝin renkontis; kaj, vidante, ke ŝi estas tiel bela, li demandis ŝin, kion ŝi faras tie ĉi tute sola kaj pro kio ŝi ploras. - "Ho ve, sinjoro, mia patrino forpelis min el la domo".

REZOLUCIO DE LA 84-A UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

La Kongreso, kunvenanta en Berlino, Germanujo, de la 31-a de julio ĝis la 7-a de aŭgusto 1999, kun 2712 partoprenantoj el 65 landoj;

DEBATINTE pri la temo *Tutmondiĝo – ŝancoj por paco?*;

KONSTATINTE ke la celo de la Internacia Lingvo Esperanto ekde la plej fruaj tempoj estas liveri al la mondo egalecan formon de komunikadon, kiu konservas la etnajn lingvojn por ties utiligo interne de la diversaj regionoj, nacioj kaj etnoj, kaj per tio certigas eblon de egaleca partopreno de ĉiuj popoloj en la tutmondiĝa procezo, kaj samtempe ŝirmas la kulturecan multkolorcon de nia terglobo;

ANALIZINTE la aktualan, ĉiam pli rapidan disvolviĝon de la tutmondiĝo, kiu tamen realiĝas laŭ modelo, kiu kuntrenas la elĉerpon de la naturaj rimedoj de nia planedo, tio estas de nia heredaĵo al la postaj generacioj, kaj kiu alprenas en multaj rilatoj la formon de super-regado fare de la plej prosperaj landoj de la mondo, kaj sekve elvokas la fortiĝon de naciismo kaj apartiĝemo multloke, kio siavice endanĝerigas pacon;

NOTINTE ke la internacia komunumo komencis alfronti tiun problemaron ekzemple per la Konferenco de Unuiĝintaj Nacioj en Rio-de-Janeiro en 1992, en kiu partoprenis la Esperanto-movado, - ke Unuiĝintaj Nacioj, UNESKO, kaj la aliaj instancoj de Unuiĝintaj Nacioj devas pluhavi centran rolon en la komuna klopodo por ekologia sekureco, homaj rajtoj kaj justeco en la mondo;

ALVOKAS al Unuiĝintaj Nacioj, al ties instancoj, al ĉiuj internaciaj forumoj, al la ne-registaraj organizaĵoj kaj al la uzantoj kaj parolantoj de Esperanto tra la mondo, doni gravan atenton al tiuj ĉi aspektoj de tutmondiĝo, kaj klopodi, direkti la procezon tiel, ke ĉiuj homoj de la terglobo profitu el ĝi. Tio povas okazi nur ĉe senkondiĉa respekto de ĉiuj homaj rajtoj, inkluzive de la rajtoj je lingva kaj kultura diverseco; - al la ekonomie prosperaj kaj politike fortaj ŝtatoj celi ne asimilon de la cetera mondo sed unuiĝon kun ĝi surbaze de reciproka kompreno, respekto kaj reciprokaj avantaĝoj, ĉar nur tia tutmondiĝo povas garantii por la homaro solidan pacon en vera feliĉo.

ASOCIO de ESPERANTO
C.P. 1111
RO-3400 CLUJ-NAPOCA
RUMANIO

dupa
fran



IMPRIMATE-PRESAJO

PAPP TIBOR
TROMBITÁS u. 12.
H-4031 DEBRECEN
UNGARIA

al